HEJS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORO:
S-RO MIGUEL A. ALTUNA

Nro. 93
Mar. - Apr. 1975

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



LA SUNO PLUE LUMOS

# ENHAVO

Notoj kaj financa raporto............2-3
IIª Aŭtuna Junulara Renkontiĝo.......4-5
HEJS:Kia estonteco?................6-7-8
Ni parolas pri...NI.................9-10
Ivo Lapenna:neŭtraleco (3)......11-12-13
Ole Kontakto!....................14-15-16
Muzika paĝo..........................16

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de HEJS, escepte en okazo de oficiala komuniko;ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro;do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

# Iª HEJS-TENDARO

Kiel montriĝas per la aliĝilo kiun vi ricevis kun la lasta bulteno,HEJS-tendaro certe okazos. Ŝajnas,krome,ke ĝi estos ege sukcesa,ĉar la partoprenantaro iĝas pli kaj pli multnombra. Malgraŭ tio,ke en la aliĝilo la limdato estas la 1ª de marto,ankaŭ pli malfruaj aliĝoj povos validi,kvankam,kompreneble,konvenas scii kiel eble plej baldaŭ la nombron de tendumontoj.Do, se ankoraŭ vi ne aliĝis,ni atendas vian tujan aliĝon.Ĝis revido en Zaragoza!

# 31ª I.J.K.

Kiel dirite en la antaŭa numero,ni disponas pri aliĝiloj por la Internacia Junulara Kongreso, okazonta en Fredericia (Danlando)de la 19ª ĝis la 26ª de julio.Aparte indas rimarkigi al vi ke la aliĝkotizo,inkluzivanta ĉiujn elspezojn varias,depende de aĝoj kaj (ne)membrecoj al TEJO, inter 3000 kaj 4000 ptoj proksimume. Pasintjaraj"suferintoj" en la 30ª IJK en Münster sendube ĝojos,ke en la aliĝilo eksplicite oni diras:"kiel ĝenerale en Danlando la manĝo estas abunda kaj varia".Amen!

# NOTOJ

-La XXXVª Hispana Kongreso okazos en Lérida de la 18ª ĝis la 22ª de julio.Informojn kaj aliĝojn ĉe Paseo de Ronda 90,apdo. 88 (Lérida)

-Abonoj al"Juna Amiko" kaj "Hungara Vivo" estas perataj de S-ro.Adonis González,Ramón y Cajal 36 Gijón (Oviedo).Jarabono por "Juna Amiko"(3n-roj) estas 75ptoj,kaj por "Hungara Vivo"(4n-roj),estas 260ptoj.

-Korespondaj kursoj pri esperanto estas gvidataj ĉe Madrida Esperanto-Liceo,Hortaleza 31,Madrid-4.

-Ĉi-jare oni eldonos 4 numerojn de la "Eŭropa Dokumentaro".Vi povas aboni ĉe 34,avenue Gounod, B-1070 Bruxelles (Belgujo).Prezo:280ptoj.

-Tria marŝo de Eŭropo,okazos de la 29ª de marto ĝis la 11ª de aprilo.Granda grupo da junaj homoj piediros de Bruselo al Strasburgo.Informojn ĉe:S-ro. René Rochette,18 rue Gatti de Gamond, B-1180 Bruselo (Belgujo)

-Labortendaro okazos en Italujo de la 2ª ĝis la 16ª de aŭgusto.Aliĝlimo:1ª de majo.Aliĝkotizo: 5.000 liroj.Informojn kaj aliĝojn ĉe:Gianfranco Molle,Via Leopardi 30-A/1,00185 Roma (Italujo)

-Estas starigita literatura konkurso ĉe: Patmlkonkurso,Via Pantano 17,I-20122Milano(Ital)

-16ª Eŭropa Feriosemajno en Svislando okazos de la 31ª de aŭgusto ĝis la 6ª de septembro.Informojn ĉe: Ernst Glättli,SAEF-sekretario,Laurstrasse 17,CH-5200 Brugg (Svislando)

-Studenta Interlingvistika Seminario.En ĝi oni pritraktos la staton de la ĝis nun aperintaj planlingvoj.Ĝi okazos de la 1ª ĝis la 4ª de majo en Varsovio.Informojn ĉe:Rada Uczelniana SZSP, Komisja Nauki,Interlingwistyczne Koło Naukowe, ul. Krakowskie Przedmieście 24,PL-00-325 Warszawa (Pollando)

–Malgraŭ la decido en la pasintjara HEJS-kunsido,ke ĉiu paginta kontraŭpage ricevus ankaŭ nian membrokarton,tio ne estis ebla pro troa laboro en aliaj taskoj.Tial ni petas al tiuj veraj interesitoj ke ili mendu membrokarton al ni Ni volonte liveros ilin.

–La VII[a] Franca-Hispana Esperantista Renkontiĝo okazos ĉi-jare en Huesca de la 9[a] ĝis la 11[a] de majo.

**FOTA KONKURSO** Jes,estis verdikto pri la fota konkurso.1-an premion atingis la foto de la kovrilo,de Francisco Jiménez,el Madrid. Ne rajtis partopreni,sed plej altkvalitaj estis la fotoj de Andrzej Korniluk,polo.Li ricevos libron,kiel rekonon al siaj meritoj.

# FINANCA RAPORTO

| | | |
|---|---|---|
| Caja y Bancos al 1.1.74 | | 77.707,42 |
| Cuotas del ano | | 23.799,- |
| Cuotas 1975 y siguientes | | 1.100,- |
| Intereses cta cte | | 224,06 |
| Donativos | | 1.119,90 |
| Beneficio lotería navidad 74 | | 6.567,- |
| Pago lotería 73 | 44.000,- | |
| Pago gtos pendientes 73 | 2.269,- | |
| Adresaro | 9.510,- | |
| gtos. confección y franqueo revista | 19.210,- | |
| Gtos, material oficina y propaganda | 4.591,40 | |
| Pago cuotas aHEF | 1.850,- | |
| Pago cuotas a TEJO | 1.165,- | |
| Donativo al G. Esperantista de Bilbao | 500,- | |
| Premio concurso fotográfico | 1.000,- | |
| Caja y Bancos al 31.12.74 | 26.421,98 | |

Noto:tiu ĉi informo estas modifebla.Kompletan bilancon oni prezentos dum la HEJS-kunsido en la Zaragoza-tendaro.

diversaj,pri kurado,kantado,mimiko;kiu partoprenis?Ĉiuj infanoj,junaj kaj maljunaj.Ĉiuj partoprenantoj ricevis verdan stelon,kaj tiu kiu kolektis pli multe da ili ricevis poste specialan premion.Preskaŭ tagmeze,estis forumo pri la temo "multiĝado de homoj sur la tero;ĝis kiam?" S-ro. Soley faris la prezentadon kaj preskaŭ ĉiuj partoprenis en la debato.Multaj personoj estis interesitaj pri la temo;bedaŭrinde ne ĉiuj sciis la esperantan lingvon.

Denove estis la horo manĝi kaj la kuiristoj devis labori por ke la manĝaĵo estu farita.

Ni devis fermi la renkontiĝon,sed antaŭe estis la disdono de la premioj,malfacila laboro,ĉar estis multaj bonaj partoprenantoj.

Poste okazis la plej grava afero:la renkontiĝo finiĝis,kaj bedaŭrinde ni jam ne povis paroli esperante kaj ridi,ludi,k.t.p.Nun ni atendas la venontjaran,kaj mi opinias ke tiu renkontiĝo estos pliserioza kaj aktiva;preskaŭ ni ne povas kompari la lastan kun la antaŭa,tio estas la plej interesa afero.

MONTSERRAT CAÑELLAS
Membro de J.E.S.S.

# KORESPONDA SERVO

-18-jara lernanto kun samaĝuloj
Sébastien Motylewski
93-259 Lodz-Dgbvowa
ul. Uminskiego 5,bl.217 m 36 (Pollando)

-25-jara komencantino
S-ino Agna Zalmanová
Panská 22/IV
47124 Mimoň (Ĉeĥoslovakujo)

# HEJS: Kia estonteco?

Jam mi raportis por vi pri la estinteco kaj estanteco de Hispana Esperanta Junulara Sekcio (HEJS), sed kiel estos la estonteco? Sendube, kvankam mi estas nek estontisto nek estontemanto, ankaŭ mi havas ideojn pri la estonteco de nia Sekcio.

Laŭ mia opinio, la agado de HEJS devos disvolviĝi sur tri flankoj: propra laboro, rilatoj kun Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj rilatoj kun Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Kiel la nomo mem diras 'propra laboro' signifas tiujn agojn propre de HEJS. Nu, mi opinias ke HEJS devos zorgi pri Regularo, Delegitoj, Informado, Varbado, Financoj, Arĥivo, Revuo.

Por solvi iajn problemojn de la Sekcio, HEJS devas havi Regularon, aprobita kaj akceptita de HEF, kaj ĝi estu bazo por ke ĉiu konu siajn rajtojn kaj devojn rilate la Sekcion. Por helpi la gvid(a-o)ntojn ĝi devos rekoni la staton de la movado en nia lando kaj por plej glata funkciado ĝi devos akcepti neŭtralecon kiel nepran bazan principon.

Preskaŭ de la komenco de la organizita priesperanta movado ekzistas la Delegitoj. Alphonse Carles, franco, proponis, dum la Ĝeneva kongreso (1906), la kreon de la esperantistaj konsuloj en ĉiuj urboj; kaj Hector Hodler, fine de 1907, ja proponis la Delegitojn, kiel demokrataj reprezentantoj de la esperantistaro, por fondi 'Universala Esperanto-Asocio'n (UEA). Lastatempe UEA kaj TEJO ankaŭ sin demandas pri la nuna rolo de la Delegitoj. Nu, kion devus fari HEJS-delegitoj? Kolekti la kotizojn de membroj loĝantaj en sia sama loĝloko, informi pri HEJS kaj varbi membrojn por la Sekcio, kunlabori en la disvastigo de Esperanto, plenumi aliajn estrar-decidojn kaj neniel resti pasiva honora reprezentanto.

Informado devos esti du-flanka: pri HEJS kaj pri Esperanto. La estraro devos klopodi diskonigi HEJS, celon, agadon kaj atingojn de la Sekcio, in-

ter la esperantistaro. Disvastigi Esperanton estas nepra devo ankaŭ por HEJS kaj tial, precipe en junularaj medioj, ankaŭ devos zorgi HEJS informojn pri Esperanto kaj esperantaj okazintaĵoj en amaskomunikiloj. Eldoni taŭgajn informilojn estos interesa helpilo.

Ĝuste por junulara organizo varbado estas ege grava, ĉar homoj maljuniĝas kaj ĉiam estas bezonataj novaj kuraĝuloj kiuj alportu ideojn kaj fortojn por antaŭenpuŝi la Sekcion. Pro tio HEJS devos estraranigi junajn, sed respondecaj, laboremulojn kaj laborigi aliajn aktivulojn por specialaj taskoj. Cetere, sukcesa varbado signifos sukcesan HEJS.

Sanaj financoj garantias la estontecon de la Sekcio, ĉar permesus al ĝi daŭran aktivadon. Mi konsideras ke kotizoj devos ĉiukaze kovri eldonkostojn de la revuo kaj la administrajn elspezojn de la Sekcio. Ekzistas ankoraŭ aliaj fontoj por havigi monon al la Sekcio, kiel povas esti donacoj, disvendado de poŝtmarkoj kaj loto, rentoj, ktp. Nu, per tiu alia mono, HEJS povus enkonduki novajn agadkampojn aŭ subteni specialajn taskojn.

Kaj ni bezonas taŭgan kaj kompletan arĥivon. Gravaj mankoj, rilate la propran bultenon, ekzistas. HEJS ricev(i-a-o)s aron da esperantaj materialoj, informiloj kaj bultenoj, kolekti ĝin taŭge estas nepra devo. Oni rekomendendas bindigi nian propran organon. Do, taŭga pretigado kaj konservado de la arhivo devos okazi.

Sed, kion pri nia organo? "HEJS" devas daŭre esti nia ligilo. Tio signifas ke ĝi devas esti samtempe nia organo kaj nia revuo. Nia organo por informi al la membraro pri niaj organizaj problemoj, pri la estraraj decidoj, pri niaj klopodoj kaj pri niaj atingoj. Nia revuo, ĉar ĝi ne povas esti simpla plia informilo de la Esperanto-movado kiam ni bezonas legi esperantlingve pri la problemoj de nia hodiaŭa mondo. Tamen, ĝi devos favori nenian politikan starpunkton aŭ ideologion.

La rilatoj kun Hispana Esperanto-Federacio dev-

os disvolviĝi sur pli amika etoso ol nun, kun plia komprenemo kaj helpo por niaj klopodoj flanke de HEF. LA ESTRARO KAJ LA MEMBRARO DE HEF DEVOS TUTE KLARE DIFERENCIGI NIAN SEKCION DE ALIAJ HEF-SEKCIOJ, ĜUSTE ĈAR NI DISTINGAS INTER NI NENIAN FAKECON PRO KIU AJN KAŬZO KAJ ANKAŬ ĈAR NIA CELO DEVAS ESTI ALLOGI HOMOJN KIUJ GARANTIOS LA ESTONTECON DE HEF. Ni havas komunan celon: la disvastigo de Esperanto; kaj por tio ni devos trovi taŭgan vojon por kunlabori, ekzemple, por pli taŭga kaj alloga koresponda kurso, por seriozigi la ekzamenojn por 'Kapabla Esperantisto' kaj 'Esperantista Instruisto' per la starigo de programoj pri la ekzamenobjektoj, por restarigi favoran kotizon por gejunuloj samtempe aliĝintaj al HEF - HEJS (tiu kotiztarifo ekzistis ĝis 1972 kiam, dum la kongreso de Vigo, laŭ iniciato de la prezidanto de HEF, ni interkonsentis ĝian malaperon) kaj por apogi kampanjojn kiuj helpos la disvolvadon de niaj organizoj (ekzemple, nun HEJS povus helpi la Federacion por sanigi la financan situacion per subteno de "Fondo de Adquisición del Local en Propiedad" kaj "Dumvivaj Membroj"; dume HEF povus helpi nin por organizi la Tendaron).

Ne glate povos funkcii niaj rilatoj kaj kunlaboro kun Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj ĝuste tie la estraro de HEJS devos pruvi sian diplomatian kapablecon, ĉar eĉ Arto ŝajnas rompi la neŭtralecon de la hispana esperanto-movado (sed, ĉu ni devas esti neŭtralaj nur eksteren de la movado?). Tamen, verŝajne ni povos sekvi la ĝisnunan sukcesan vojon.

Ĉio ĉi signifas nek sugeston, nek proponon, nek laborplanon; estas, simple, kiel mi konceptas la estontecon de nia Sekcio. Do, kiel, laŭ mia opinio, povos esti la diversflanka agado de HEJS. Pro tio, neniu devas serĉi alian vidpunkton, ĉar tio neniel signifas antaŭkondiĉon por HEJS kaj, krome, mi ne analizas ĉu tiuj ideoj estas realigeblaj aŭ ne. Cetere, HEJS verŝajne devos agi laŭ la diversaj eblecoj, ĉu financaj, ĉu movadaj, ĉu ĝeneralaj.

JUAN AZCUÉNAGA

# NI PAROLAS PRI... NI

Kiel dirite en la lasta numero,ni klopodos en ĉiu numero havi paĝo(j)n dediĉita(j)n al klarigo de nia situacio kiel aktiva sekcio.Krome,mallonge,ni povos sciigi pri la aktivado de niaj membroj en la diversaj lokoj.Ĝis nun ni preskaŭ tute neglektis tion pro manko de spaco.

Ĉi-rilate,ni povas plezure informi vin ke ne nur unu junulara grupo estas vigla,nome,tiu de Sabadell,sed nun ĉe la madrida Liceo la junulara grupo nombras 30,kaj komencis eldoni plurpaĝan informilon:"Nia Voĉo".Do,ili ricevu nian elkoran gratulon.

Pri nia aktivado,la estraro komencis entrepreni la novjaran taskon.Nia vicprezidanto pri delegitoj kaj varbado sendis cirkuleron al ĉiu delegito petante kunlaboron kaj invitante ĉiujn al la tendaro en Zaragoza.Ankaŭ la grupoj ricev(i-o)s cirkuleron petantan diskonigon de nia ekzisto inter la junularo kaj lernantoj.Do,ni esperas ke ĉi-jare ja plialtiĝos nia membronombro,kio jam ekokazis per varbado de du aktivaj delegitoj.

Cetere,la kantareto,malgraŭ la malmulta kunlaboro,estos baldaŭ preta,kaj eble vi ricevos ĝin kune kun tiu ĉi numero.Kiel ajn,la partoprenantoj en la tendaro sendube disponos pri ĝi ĉe la kampfajro.

Informo pri nia agado dum la pasinta jaro estas jam sendita al TEJO-sekretario kaj al HEF-estraro.Ni dezirus publikigi ĝin en tiu ĉi bulteno,sed ne eblis pro manko de spaco.Ni vidos ĉu en la sekvanta ni havos ĝin.Tiuj kiuj ankaŭ estas membroj de HEF povos ĝin legi en la sekvanta numero de Boletín.

En tiu ĉi informo,ni analizas la disvolviĝon de nia situacio en la enlanda kaj internacia kampoj.Kiel vi scias,pro senĉesa kontaktado de

la koncerna tiama respondeculo kun la TEJO-sekretario,niaj rilatoj kun tiu organizo estis tre fortaj,eĉ tiagrade,ke nun 4 membroj de HEJS estas TEJO-komitatanoj,unu el ili estrarano.Do,tio ĉi klare vidiĝas niajn sukcesojn en tiu sfero.

Tute alie okazis enlande.La respondeculo tiama pri rilatoj kun delegitoj kaj varbado,pro troa okupiteco en aliaj esperantaj taskoj,tute ne agis,ne aktivigis la delegitojn.Sume,nia membraro,post kelkaj aliĝoj kaj eksiĝoj,altiĝis en UNU plia membro en la tuta jaro.Ni esperas ke tio ne plu okazos,kaj tiu ĉi jaro vidiĝas jam de la komenco pli sukcesa.

Ankaŭ enlanda malsukceso estis tiu projekto de tendaro en la pasintjara majo;nekonvenaj estis la datoj kaj ĝi ne povis okazi.Ĉi-jare,jes, ĉar jam ni scias pri partoprenontoj.

Cetere,estis granda eraro ne proponi plialtigon de la kotizoj por tiu ĉi jaro.Feliĉe,multaj el vi solvis tion per bonvola pago de 50ptoj., aŭ pli grandaj donacoj.

Se niaj rilatoj kun la internacia junulara organizo,TEJO,feliĉe antaŭeniris,ni ne povas diri la samon pri tiuj kun Hispana Esperanto-Federacio,nia patrina asocio.Tio ĉefe ŝuldiĝas al maldiplomatiaj agoj flanke de HEJS,sed,komprenebie,ekzistas kaŭzoj kiuj,miaopinie,plene pravigas nian sintenon.La kialo estas ega malakurатemo de HEF en la plenumo de la devoj.Konkrete, en tute malfrua respondo al niaj leteroj,en kiuj ni petas permeson por entrepreni taskojn,organizi ion,aŭ aliaj aferoj.Tiusence,sufiĉas diri ke HEJS sendis leteron al HEF la 12-an de la pasinta novembro,kaj hodiaŭ,19-an de februaro, ankoraŭ ne venis respondo,malgraŭ ke ni petis ĝin en tri postaj leteroj.Tiel oni povas konjekti ke niaj leteroj,iom post iom,estas pli kaj pli maldiplomatiaj pro elĉerpiĝo de la pacienco. Per tio oni konkludas ke por havi bonajn rilatojn kun HEF plej konsilinde estas ne havi ilin.

*(Red.)*

# 3 Ivo Lapenna: neŭtraleco

D-ro Lapenna fariĝis, kontraŭ sia volo, "faligota bastiono de neŭtraleco", sed neŭtraleco estis vaste diskutata en nia movado. Kaj ankaŭ D-ro Humphrey Tonkin akcentis, post prezidantiĝo, ke "neŭtraleco estas kaj restos la ĝusta vojo por nia Asocio". Do, verŝajne, UEA (Universala Esperanto-Asocio) ankoraŭ restos neŭtrala malgraŭ la eksiĝo de D-ro Lapenna. Sed, kiel komprenis la neŭtralecon la plej granda figuro, kiu sur la organiza kampo aktivis en la ĝisnuna historio de la Esperanto-Movado?

"La Internacia Lingvo kiel esprimo kaj antaŭeniganto de universalismaj tendencoj" estis temo de la parolado de D-ro Lapenna en la Malferma Kunsido de la 35-a Universala Kongreso (UK) (Paris, 1950). Kaj tiam li diris: "U.E.A. estas neŭtrala. Ĝi troviĝas ekster kaj super la politikaj luktoj, sed en ĝiaj fundamentoj troviĝas la principo de la respekto al homaj rajtoj kaj liberecoj. Tio signifas, ke ĝi -celante disvastigi la Internacian Lingvon kune kun ĝia nedisigebla apartenaĵo: la spirita proksimiĝo de la homoj- ebligas al ĉiuj siaj membroj konservi siajn proprajn mondrigardojn kaj konvinkojn, libere esprimi siajn opiniojn. La neŭtraleco ne signifas, do, senideecon aŭ uniformigon de la penso! Male, ĝi estas konvena grundo por kresko kaj florado interne de movado de ĉiaspecaj pensoj kaj ideoj -krom tiuj, kiuj evidente kontraŭas al la esenco mem de la Internacia Lingvo kaj de ĝia idea signifo". Kaj, krome, li aldonis: "La neŭtraleco, plue, signifas, ke en eksteraj rilatoj ni ligas nin al neniu politika koncepto, al neniu alia movado, al neniu fremda ideologio. Kiel esperantistoj ni estas memstaraj kaj sendependaj kaj ni iras nian propran vojon. Tio, kompreneble, ne signifas, ke ni estas indiferentaj rilate al la okazaĵoj en la mondo."

Kompreneble ankaŭ ke kiam li traktis la "Ideo-

logiajn elementojn de esperantismo", —festparolado okaze de la Inaŭgura Kunsido de la 41-a UK (Kopenhago, 1956)- li denove tuŝis la demandon pri neŭtraleco: "U.E.A. estis, devas esti kaj restos strikte neŭtrala rilate al religio, politiko, sociaj demandoj kaj nacieco. Sed la Esperanto-Movado ne estas kaj ne povas esti neŭtrala rilate tiujn tendencojn, kiuj kontraŭas la Internacian Lingvon kiel tian, aŭ detruas la bazajn principojn de egaleco, solidareco kaj libereco, sur kiuj sole povas kreski kaj prosperi Esperanto."

Denove li tuŝis la demandon pri neŭtraleco okaze de parolado pri "Universala Esperanto-Asocio" en la Seminario de Germana Esperanto-Junularo (Hamburg, 1965). Tiam li diris ke "kvankam neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj, U.E.A. tamen eksplicite deklaris en sia Statuto, ke la respekto de la homaj rajtoj estas esenca kondiĉo de ĝia laboro."

"Kelkaj fundamentaj tezoj" estis la temo kiun prezentis D-ro Lapenna dum la malferma parolado de la 53-a UK (Madrid, 1968) kaj ankaŭ traktis la neŭtralecon: "UEA kiel tia estas politike neŭtrala, sed tio neniel implicas, ke ĝiaj membroj estus en kiu ajn senco senigitaj de sia rajto havi proprajn politikajn, filozofiajn, religiajn aŭ aliajn konvinkojn. UEA ne estas, nek laŭ sia Statuto povas esti, neŭtrala koncerne kiun ajn aspekton de la lingva problemo, inkluzive la politikan, aŭ rilate kiun ajn formon de diskriminacio kaj persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo aŭ la Esperanto-organizaĵoj. Strikta observado de tiel difinita principo de neŭtraleco fare de ĉiuj organoj de la Asocio kaj de ĉiuj funkciuloj, kiam ajn ili agas en la nomo de UEA, estas unu el la bazaj kondiĉoj de ĝia universaleco kaj tial ankaŭ de ĝia sukcesa laboro."

En Londono (1971), okaze de la 56-a UK, D-ro Lapenna tuŝis neŭtralecon dum sia Festparolado kaj dum Debato pri la neŭtraleco de U.E.A. "Multaj opiniis -diris D-ro Lapenna-, ke UEA, kvankam politike neŭtrala, ne povas kaj ne rajtas resti indiferenta ri-

# - Ole kontakto! -

Antaŭ ne longe, parolante kun esperanta amiko pri la nuna situacio de la esperanta movado, mi konstatis ke ni ambaŭ samopinias pri la fakto ke nia afero kvankam ĉiam ŝajnas resti statika kaj kelkfoje eĉ retroiri, ĝi, paŝon post paŝo, malgraŭ ĉiaspecaj baroj kiaj la atakoj de malamikoj kaj la internaj konvulsioj, pli malpli marŝas antaŭen.

Ankaŭ ni samopiniis pri la ekzisto en Esperantujo de aferoj kiujn oni povas etikedi "pli subtenindaj ol aliaj", jen pro sia signifo jen pro sia celo, aŭ ambaŭe; kaj ke inter tiaj perloj (legu: subtenindaĵoj), troviĝas certe la revuo KONTAKTO. Eble oni kontraŭdiros nin asertante ke revuoj similaj al KONTAKTO, jam estas eldonataj nacilingve, kaj tial ĝia ekzisto estas ne necesa. Sed al tiuj mi obĵetus ke preskaŭ ĉiam la nacilingvaj periodaĵoj ne restas senpartiaj antaŭ la diversaj mondaj problemoj, kaj estante ilia vidpunkto kondiĉita de la naciaj strukturoj



konstituas — la plejmulto — fermatan cirklon el verkantoj kaj legantoj. Do, ĝuste pro tio, ni bezonas neŭtralan forumon por libera interŝanĝo de pensoj kaj kulturoj sur egala bazo, krisolon kie kunfandiĝu ĉiaj tendencoj kaj ideoj, kia vere estas nun KONTAKTO.

Mi povus daŭre paroli favore al la TEJO-revuo, sed cele ne tedi vin, mi nur prezentas la aron de artikoloj entenataj en la lasta numero de la revuo, kiun iu nomis la "dika", pro la fakto ke ĝi estas numero duobla ol

kutime.

"Spontaneco kaj rolo de organizita laboro" estas fragmento de la impona verko de la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA: "Esperanto en perspektivo".

"Makaku kaj bona knabo, kiu parolas portugale", prezentas al ni ĉapitron el verko pri la kultura imperiismo en la afrikaj kolonioj portugalaj.

La nunan ekonomian situacion en Britio kaj ĝiajn eblajn elirvojojn, pritraktas "Knaras mekanismo de profito".

LA DETRUHELPO
POR LA EVOLULANDOJ



Pri la atoma danĝero temas "Ĉu eksplodos baldaŭ la terglobo?", kaj pri la dua sesio de la interparoloj pri limigo de strategiaj armiloj, "Kapablo milfoje mortigi".

Ekstraktonel la referaĵoj prezentitaj en la Seminario pri Lingvo kaj Socio organizita de la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO, oni trovas en "Refoja konsciigo estas la merito". Kaj novaĵojn pri la Tridek unua Internacia Junulara Konferenco de TEJO en Fredericia, "En la ponta urbo".

"Jure kodigi la rajtojn" sciigas nin pri la klopodoj prepari ĉarton pri minoritatoj.

Vere interesaj estas "La scienca oazo de Ber-Ŝevo", "Sukcesa konservado de la propra identeco", "Kien iras la t. n. naftodolaroj" kaj "Plasto - la vaganta rubo".

Pri la nord-irlandaj infanoj, edukitaj en etoso de malamo, temas "La milito de infanoj" kaj pri la hodiaŭa itala literaturo "Eskapo en la idilion de simpleco".

"La genio senprecedenca" estas prilaboraĵo, laŭ

originalo de "UNESKO-kuriero" pri la notlibroj de Leonardo da Vinĉi. Finiĝas la revuo per sia kutima "Mozaiko", kiel ĉiam semita de interesaĵoj.

Fine de 1974 aperis tiu nova numero kiun ni ĵus menciis; tamen, bedaŭrinde, KONTAKTO daŭre aperas kun subvencioj el la kaso de TEJO, tial ke se en la proksima estonteco ne pligrandiĝos la nombro de ĝiaj abonantoj, verŝajne UEA rekonsideros la ekonomiecon de ĝia plua eldonado, kaj tio estus domaĝo.

Nu, ne sufiĉas laŭdi KONTAKTOn, sed necesas ĝin subteni. Abono por 1974 kostas 11 guldenojn kaj por 1975, 13 guldenojn (210 kaj 270 ptojn., respektive).

MIGUEL G. ADÚRIZ

## La Kri´

Casadas la trup´ indiana
Sur montoj kaj vasta preri´,
Kaj se vi postulas parolon,
Kanjono respondas per kri´:
(refreno)
Japanoj, eskimoj, nigruloj,
Urbanoj kaj buboj kaj mi
Jam uzas la Zamenhof-lingvon,
Do vivu, prosperu la kri´:
(refreno)
Tra tuta ĉi vasta terglobo,
En urboj de ĉiu naci´
Troviĝas la samideanoj,
Soniĝas la tutsama kri´:

Refreno :
Esperanto estas la lingvo por ni, por ni,
Esperanto : Jen estas lingvo por ni.

## MUZIKA PAGO

Pro manko da spaco en ĉi numero, nia muzika paĝo estas nur paĝparto, kiel vi povas konstati, devigante al ni tiu cirkonstanco, prokrasti la aperon de la artikoloj ricevitaj en la redaktejo.

liven



(por esti kantata laŭ la angla melodio " My Bonny " )

